Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)
La 4-a Virtuala Kongreso de Esperanto • 23 – 26 novembro

# Migranta Hirundo

22-a de novembro 2023, numero 2
Redaktas Dmitrij Ŝevĉenko kaj Anna Striganova

## Programeroj de Duncan Charters dum la 4-a VK

### Ĉu vi estas interkulture kompetenta?



Esperantistoj nature ŝatu aliajn kulturojn, ĉar la celo de la lingvo estas faciligi komunikadon inter diversnacianoj kaj diverskulturanoj. Tamen ĉu tiu kapablo estas natura por individuoj kiuj akceptis la premisojn de Esperanto kaj eniris ĝian komunumon, aŭ ĉu necesas konsciigo kaj trejniĝo pri kulturaj diferencoj kaj kiel transponti ilin? Sekve de klariga prezentaĵo, bonvenos reagoj kaj demandoj. Poste la partoprenantoj havos la okazon diskuti en paroj en apartaj zoom-ĉambroj pri siaj pozitivaj kaj negativaj kulturaj spertoj. La paroj povos raporti poste pri interesaj tiurilataj spertoj de la partnero. Konkluda diskuto konsideros estontajn paŝojn kaj rekomendojn por plikapabligi nian komunumon pri interkomunikado trans kulturoj.

*Vendredo la 24-a de novembro 2023, 17:00 – 18:30 UTC*

### Strategia Planado

Mallonga enkonduko al la kvar kolonoj de strategia planado, poste tempo por doni ideojn pri ĉiu el ili (KIRI – Kunlaborado, Informado, Rilatoj, Instruado).

*Strategia Planado 1. Sabato la 25-a de novembro 2023, 17:00 – 18:30 UTC*
*Strategia Planado 2. Dimanĉo la 26-a de novembro 2023, 18:00 – 19:30 UTC*

La horaro estas provizora. Povas okazi ŝanĝoj. Sekvu la aktualan programon en la sistemo de RetEvent.

## Ne preterlasu!

**Malfermo de la 4-a Virtuala Kongreso de Esperanto (4-a VK):**
bonvenigaj vortoj, oficialaj paroladoj, prezento de la emblemo de la kongreso, kontinentaj salutoj, himno *La Espero*. La malfermo okazos la 23-an de novembro 2023 je la 12-a horo UTC.

**Gvidas Fernando Maia Jr.**

# UEA respondas

La partoprenantoj de VK havos la eblon realtempe fari demandojn al la Estraro de UEA kaj la Ĝenerala Direktoro.


La programero komenciĝos je la 13:00 (UTC), sabate, la 25-an de novembro 2023.




**La Estraro de UEA:**

Duncan Charters (Prezidanto)
Fernando Maia Jr. (1-a Vicprezidanto)
Amri Wandel (2-a Vicprezidanto)
Aleks Kadar (Ĝenerala Sekretario)
Aurora Bute
Gong Xiaofeng
François Lo Jacomo
Jérémie Sabiyumva
So Jinsu
**Ĝenerala Direktoro:** Martin Schäffer


**Speciala oferto!**




Antaŭ 125 jaroj, la 28-an de novembro, mortis la svisa poeto kaj prozisto **Conrad Ferdinand Meyer** (n. 1825). Ĉi-monate ni proponas liajn Elektitajn poemojn kun sesona rabato, sendepende de la mendata kvanto: https://katalogo.uea.org/?inf=7399


# Frano prezentos la kanton "Rapidaj ŝipetoj"

Frano (Francois Blanc) estas muzikisto el Liono (Francio), amanto de brazila muziko kaj de la metodo "Faru mem ĝin" (DIY/FMĜ). Li verkas kantojn, kies tekstoj priskribas lian vidpunkton pri la nuna mondo. Cetere, en sia hejmstudio, Frano preparas albumeton, eldonotan ĉe Vinilkosmo. Li malfermos la "Internacian Artan Tageron" de la 4-a VK per la kanto "Rapidaj ŝipetoj", kies tekston vi trovas nun en nia kuriero:



**"Rapidaj ŝipetoj"**

*Teksto kaj muziko: François Blanc*
*Teksto-polurado: Miguel Gutiérrez*

Manolo estis fiŝkaptisto
kiu havis malnovan ŝipeton
Kiam la kaptaĵoj iĝis nesufiĉaj,
vi vendis al li ŝipon pli rapidan.
Ekde tiu tago estas pli kaj pli da fiŝoj kaptitaj
dum vi kalkulas vian monon
Manolo vendis sian ŝipeton al ulo
kiu elmigrintojn neleĝe portis transmaren.
Do vi vendis pli rapidajn ŝipojn al polico
Por persekuti tiujn homojn.
Ekde tiu tago estas pli kaj pli da homoj kaptitaj
dum vi kalkulas vian monon
La policoŝipoj estis tro efikaj
kaj neniu plu riskis transiri la maron.
Do vi vendis al ili novajn ŝipojn
pli rapidajn ol la ŝipoj policaj.
Ekde tiu tago la ŝipetoj pli kaj pli rapidas,
kaj via mono senĉese multobliĝas.

# La scienca programo de la Virtuala Kongreso

★ Amri Wandel



Preskaŭ la tuta scienca programo de la 108-a UK en Torino videblos en la VK. Tio estas, 7 el 9 prelegoj de la Internacia Kongresa Universitato (IKU), kaj 6 el 10 prelegoj de la Scienca Kafejo (SK).

Plejparte la prelegoj okazos vive, kaj estos eblo fari demandojn al la prelegantoj.

Tuj post la VK-malfermo, ĵaŭdon 23.11 je 13h UTC okazos la **IKU-malfermo,** en kiu mi koncize prezentos la prelegojn kaj prelegantojn.

Sekvos ĝin mia IKU-prelego "La Serĉo de Eksterta Vivo: eksterplanedoj, NIFOj kaj SETI."

Ĉiuj prelegoj estos spekteblaj kadre de la VK ankaŭ poste, ĝis la fino de decembro.

Samtage vi povos ĝui "La DNA de Esperanto" (IKU) de Fabrizio Angelo Pennacchietti kaj "La arkivo de Universala Esperanto-Asocio (UEA)" (SK) de Bernhard Tuider.

En la programo de la Virtuala Kongreso titoloj de la prelegoj, kiuj okazas kadre de la Internacia Kongresa Universitato estas markitaj per la indikoj "IKU" kaj "IKU AIS".

# IKU-libro de 2023 estas elŝutebla senpage!

Same kiel la IKU-libroj en 2020, 2021 kaj 2022, la IKU-libro 2023 estas senpage elŝutebla! Vi povas sekvi la prelegojn de la VK, akompane de la tekstoj, kiuj plivastigos la superrigardon de la temoj.

Ni invitas vin spekti kaj "ŝati" la filmeton ĉe jutubo, kie Amri Wandel prezentas la libron: https://mallonge.net/16g

**Pri la libro:**

***Internacia Kongresa Universitato,*** *76-a sesio, 108-a Universala Kongreso de Esperanto, Torino, Italio*

**Provlegis** Rob Moerbeek, **Redaktoroj:** Anna Striganova, Dmitrij Ŝevĉenko, Amri Wandel

Torino, Eldonejo Impeto, 2023, 242 p.




**Elŝutu libere kaj senpage ĉe:**


**http://iku4.trovu.com**

**Vi povas esti aŭtoro de *Migranta Hirundo* kaj la *Reta Revuo*! Por kontribui, skribu al la redakcio**



**revuo.esperanto@gmail.com**

# Grave: Aliro al la kongreso por la aliĝintoj




La 22-an de novembro ĉiuj partoprenantoj de la 4-a VK ricevis retmesaĝon kun la temo "4-a Virtuala Kongreso: viaj ensalutdatumoj por la platformo de VK".

Ĝi enhavas ĉiujn bezonatajn informojn kaj instrukciojn por partopreni la kongreson.


Kaze de problemo pri ensaluto, aŭ se vi forgesis vian pasvorton aŭ volas ĝin ŝanĝi, vi povas uzi la funkcion "Reakiri pasvorton" en la platformo.

Se vi havas demandojn, unue legu la instrukciojn en la retpaĝo (maldekstre sube en la menuo), kaj poste kontaktu la teknikan teamon ĉe *info@vk.esperanto.net*, se vi ne trovis la respondon tie.


# Programerserĉilo

Por trovi certan interesan programeron aŭ temon, uzu formularon en la programlisto, kiu troviĝas en la supra bloko en la paĝo – https://vk.retevent.com/programo.

Krom la eblo serĉi uzante ŝlosilvorojn kaj ŝlosilfrazojn, vi povas uzi filtron laŭ la datoj kaj tipoj de la programeroj, kiujn vi povas ordigi kaj vidi list- aŭ kalendarforme.




# Laŭtemaj kaj "sentemaj" vidbabilejoj




Krom oficiala programo de la Virtuala Kongreso aperas pliaj dumtagaj programeroj – "Laŭtemaj vidbabilejoj". Trovu ilin en la programlisto.

Krom ili dum la tuta kongreso estas uzataj vidbabilejoj "Koridoro", "Kafejo" kaj "Drinkejo" por neformalaj diskutoj kaj renkontiĝoj en amika etoso.

Tiuj vidbabilejoj estas je via dispono diurne – 24 horojn tage!